

## Por « La SAGO », organo de SATamikaro

### Temo : Malsama ekvilibro inter la parola kaj skriba lingvoj

---

En Bjalistoko, kiam Zamenhof loĝis tie, vivis diversaj etnoj kaj homgrupoj. Estis poloj, katolikaj, kiuj skribis per latinaj literoj (la niaj). Estis rusoj, ortodoksoj, kiuj skribis per kirilaj literoj. Estis germanoj, protestantoj, kiuj skribis per gotikaj literoj. Estis judoj, kies religio estis judaismo, kiuj skribis per hebreaj literoj. Mi eksciis antaŭ kelkaj tagoj, ke hebreaj literoj havas nomon kaj estas simboloj. Por mi la literoj ne havas nomon, ne estas simbolo. La grekaj literoj alfa kaj omega havas simbolon de komenco kaj fino, tio devenas el la biblio. El tiu skribmaniero venas la orto "alfabeto", ĉar beta estis la dua litero post alfa.

Dum entute dekunu monatoj mi restadis en Japanio, kie uzatas ideogramoj, iu instruis al mi la esprimon ideobildo... Do en Japanio mi promenas ene de nelegebla desegnaĵa arbaro... Mi sentas min kiel kvarjara infano, kiu ne kapablas legi... Stranga sento! Ideogramoj tute ne similas al literoj. Ĉiu el ili havas signifon, unu ideogramo similas al unu vorto. Infanoj dum 9 jaroj lernas 1950 el ili. Ekzistas pliaj por intelektuloj. Ene de ideogramo aŭ ideobildo aperas foje desegnoj kun signifoj. Ekzemple en unu ideobildo vidiĝas arbo kaj homo, kaj ĝi signifas ripozon. Do temas pri tre simbola skribmaniero. Ciuj japanoj desegnas ekzakte laŭ la sama fingro "danco" la ideogramon, do vidante la dancantan manon tuj oni povas diveni, pri kiu ideogramo temas, se oni lernis ĝin. Tute male ĉe mi en Svislando iu persono desegnas la ciferon 9 per komenco sube farante unu solan strekon, aŭ per komenco supre dekstre farante cirklon maldekstren, revenante al la komenca punkto kaj poste desegnante la voston de 9... ĉiu estas libera. En la lernado de Esperanto japanoj ŝatas legi la vortojn, ĉar en ilia lingvo la skribmaniero donas al ili la signifon. Tion la instruisto nepre respektu. En mia lando la instruistoj parolas, ripetigas, demandas, atendas respondojn. Tia maniero estas malfacila por orientazianoj. Mi volas atentigi, ke la ekvilibro inter skriba lingvo kaj parola lingvo malsamas laŭ la kulturoj. Bonvolu noti, ke ideogramoj uzatas en Ĉinio, Japanio kaj Tajvano. Ekzistas multegaj skribmanieroj en la mondo, alfabetoj aŭ aliaj. En Afriko pluraj malaperis pro koloniado, ili estis detruitaj aŭ malpermesitaj. Kelkaj alfabetoj aŭ ideogramsistemoj skribiĝas de dekstre maldekstren, aliaj de maldekstre dekstren. Kelkajn lingvojn oni skribas vertikale, kiel la ideograma lingvo japana, ĉina kaj tajvana.

Mi vidis la mongolan, tre belan skribmanieron, kiu similas al la araba alfabeto, tamen skribiĝas vertikale. Mongolaj samideanoj klarigis al mi, ke iu pramongolo prenis la araban skribon, turnis ĝin je 90 gradoj por skribi vertikale, skribado pli komforta, kiam la skribanto sidas sur galopanta ĉevalo. Provu! Vere, la mongola skribmaniero estas tre bela eĉ sen galopado!

Fine venas mia subskribo, mia nomo Mirejo; maldekstre per hiragana, silaba alfabeto japana, meze per katakana, silaba alfabeto japana (jes, ekzistas du tipoj), kaj dekstre per 3 ideogramoj elektitaj de HORI Yasuo, kiu pentris la tuton.

Mireille Grosjean

© MIR 2013

